

Михаил Лермонтов,

## La anĝelo

*tradukita de Boris Mirski*

Kun kanto solena en nokta ĉiel'  
Sin portis mirinda anĝel';  
Kaj luno, kaj steloj, kaj nuboj en  
rond'  
Atentis la himnon de l' mond'.

Li kantis pri vivo sen zorga ĉagren'  
Sub branĉoj de pura Eden';  
Kaj laŭd' al keruboj, al granda Sin-  
jor'  
Elflugis sincere el kor'.

En brakoj animon li portis al ter',  
Al mond' de malĝojo, mizer';  
Kaj restis la kanto en juna animo  
Sen vorto, sen unu esprim'.

Kaj plena je stranga, mirinda dezir'  
Ĝi vagis en mond' de sopir',  
Kaj tedis al ĝi post la kant' de l'  
eter'  
La veaj motivoj de l' ter'.

...

Михаил Лермонтов,

## Anĝelo

*tradukita de Vasiliĵ Devjatnin*

En mezo de nokto, en blua ĉielo,  
Traflugis kaj kantis plej bela anĝelo.  
Kaj nuboj kaj steloj kaj lun' en irado  
Atentis kun ĝojo je l' sankta kanta-  
do.

Li kantis feliĉajn, neniam pekantajn  
Spiritojn, kun Di' en ĉielo loĝantajn;  
Li kantis pri Patro ĉiela kaj tera—  
Kaj lia laŭdado ne estis malvera.

Animon tre junan en brakoj li tenis;  
En mondo malgaja naskiĝi ĝi venis.  
Kaj sono de l' kanto en juna animo  
Restadis sen vort', sed kun viva esti-  
mo.

Tre longe en mondo ĝi estis premata,  
Je revo mirinda pri Di' plenigata!  
Kaj ŝanĝi la kanton de l' sankta sin-  
cero  
Ne povis por ĝi ĉiuj kantoj de l' tero.

...

Михаил Лермонтов,

## Der Engel

*tradukita de N. N. 98*

Argiope-informo:  
La aspekto de tiu ĉi versio estas ba-  
rita.  
Supozeble la aŭtoro decidis tion.

Михаил Лермонтов,

## Ангел

По небу полуночи ангел летел,  
И тихую песню он пел,  
И месяц, и звезды, и тучи толпой  
Внимали той песне святой.

Он пел о блаженстве безгрешных  
духов  
Под кущами райских садов,  
О Боге великом он пел, и хвала  
Его непритворна была.

Он душу младую в объятиях нес  
Для мира печали и слез;  
И звук его песни в душе молодой  
Остался - без слов, но живой.

И долго на свете томилаcь она,  
Желанием чудным полна,  
И звуков небес заменить не могли  
Ей скучные песни земли.

...

*Traduko de la Rusa poemo “Ангел” de МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (\*1814-10-15 – †1841-07-27) en Esperanton de Boris Mirski.*

*Arg-1039-2113 (2014-06-03 11:55:42)*

*Tiu ĉi poem-esperantigo troviĝas en <http://donh.best.vuh.net/Esperanto/iteraturo/Poezio/lermontov/angxelo.html>.*

*Traduko de la Rusa poemo “Ангел” de МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (\*1814-10-15 – †1841-07-27) en Esperanton de VASILIJ DEVJATNIN (\*1862 – †1938).*

*Arg-1039-2114 (2014-06-03 12:21:00)*

*Pri la tradukinto vidu la vikipediĵojn [http://eo.wikipedia.org/wiki/Vasilij\\_Devjatnin](http://eo.wikipedia.org/wiki/Vasilij_Devjatnin).*

*Traduko de la Rusa poemo “Ангел” de МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (\*1814-10-15 – †1841-07-27) en la Germanan de N. N. 98.*

*Arg-1039-2112 (2014-06-03 17:30:50)*

*Tiu ĉi poem-germanigo troviĝas en la retejo <http://maschas-buch.blogspot.de/2011/09/lermontov-der-engel.html>. Vidu ankaŭ: <http://home.arcor.de/berick/illeguan/lermont1.htm>.*

*Verkinto de tiu ĉi Rusa poemo estas МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (\*1814-10-15 – †1841-07-27).*

*Arg-1039-2110 (2014-06-03 12:23:12)*

*Pri la poeto Lermontov vidu la retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Михаил\\_Лермонтов](http://eo.wikipedia.org/wiki/Михаил_Лермонтов).*